

12-A ORDINARA DIMANĈO 21-an de junio 2015

KIU ESTAS TIU? EĈ LA VENTO KAJ LA MARO OBEAS AL LI! - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Marko 4, 35-41

En tiu tago, kiam vesperiĝis, Jesuo diris al siaj disĉiploj: «Ni transiru al la alia bordo de la lago». Ili forsendis la popolamason, kaj portis Jesuon per la ŝipo, en kiu Li jam estis. Ankaŭ aliaj barkoj akompanis Lin.

Intertempe leviĝis fortega vento, tiel ke ondoj estis ĵetitaj en la ŝipeton, kaj ĝi estis jam preskaŭ plena de akvo. Sed Jesuo dormis en la malantaŭa parto de la ŝipeto, kun la kapo sur kuseno. Tiam oni vekis Lin, dirante: «Majstro, ni pereas! Ĉu Vi neniel zorgas pri tio?».

Vekite, Jesuo admonis la venton, kaj diris al la lago: «Silentu, kvietiĝu!». Tiam la vento ĉesis, kaj fariĝis granda trankvilo. Poste Li diris al ili: «Kial vi estas tiel timemaj? Ĉu vi ankoraŭ ne havas kredon?».

Sed ili treege miris, kaj diris unu al la alia: «Kiu do estas tiu? Eĉ la vento kaj la maro obeas al Li!».

Konklude de la parabolo de la semanto Jesuo komparis la Regnon de Dio al sinapa grajnero kiu, ĵetita en la hejman legomĝardenon, produktas arbon tiom grandan ke la birdoj de la ĉielo venas por konstrui sian neston tie.

Kion volis diri Jesuo? La regno de Dio ne plu estas rezervita por unu popolo, unu nacio, unu religio, sed ĝi estas malfermita por la tuta homaro.

La tuta homaro povas trovi sian rifuĝon, povas trovi akcepton, povas trovi sian hejmon. Tiu estas la signifo de "konstrui sian neston".

Jesuo do volas komprenigi, iom post iom, al la ribelemaj disĉiploj ke li ne venis por restarigi la mortintan regnon de Israelo, sed por inaŭguri la regnon de Dio, ne la privilegion de unu popolo, sed la amon de Dio kiu ne konas limojn kaj estas elverŝita por la tuta homaro.

Sed je tiu punkto komenciĝas la problemoj kaj la malfacilaĵoj.

Skribas la evangeliisto ke "*en tiu tago*", post kiam do Jesuo komparis la Regnon de Dio al tiu arbo kie ĉiuj povas trovi rifuĝon, "*kiam vesperiĝis*," – kvin fojojn enestas tiu esprimo "*kiam vesperiĝis*" en la evangelio de Marko, kaj ĉiam en negativa senco, indikante kontraŭecon, kontraŭstaron aŭ, kiel en tiu ĉi kazo, nekomprenon de Jesuo kaj de lia mesaĝo.

"Jesuo diris al siaj disĉiploj: «Ni transiru al la alia bordo de la lago».

"Transiri al la alia bordo" signifas iri en paganan teritorion. Nu, ĉiun fojon kiam Jesuo invitas siajn disĉiplojn transiri al la alia bordo, okazas ĉiam akcidento, ĉiam estas rezisto. La disĉiploj nenion plian volas scii, ili, ankaŭ se Jesuo predikas la Regnon de Dio, ili komprenas "la regnon de Israelo", ili pensas pri la regado de Izraelo super ĉiuj aliaj nacioj, kiuj devis esti submetataj, devis esti regataj; la izraelanoj estus devintaj preni la trezorojn de tiuj ĉi popoloj kaj ili ne pensas kunporti la trezorojn de Dio al la paganoj.

Jesuo do diras "ni transiru al la alia bordo de la lago". Kaj, skribas la evangeliisto, ke "*ili forsendis la popolamason, kaj portis Jesuon per la ŝipo, en kiu Li jam estis. Ankaŭ aliaj barkoj akompanis Lin.*

Nu, kio okazas? "*Intertempe leviĝis fortega vento*".

La evangeliisto referencas iom al historio de Jona kiu rezistas al la dia taskigo kaj lia rezisto kaŭzas grandan ŝtormon. La Sinjoro estis dirinta al Jona: "*Iru en paganan teritorion por prediki la konvertiĝon*", kaj Jona pripensas: "sed se mi iras en paganan teritorion kaj predikas la konvertiĝon, poste la Sinjoro ilin pardonas"; tial li iras en malan direkton ĉar li tute ne volas porti la amon de Dio al la paganoj, kaj ekfuriozas granda ŝtormo.

Ankaŭ en tiu ĉi kazo, kio estas tiu ŝtormo? Tiu ĉi ŝtormo, en figura senco, estas la rezisto de la disĉiploj iri en paganan teritorion. Sed la ŝtormo

rilatas nur al la disĉiploj. Vidu, la priskribo kiun faras la evangeliisto diras ke *“tiel ke ondoj estis ĵetitaj en la ŝipeton, kaj ĝi estis jam preskaŭ plena de akvo”* kaj Jesuo poŭpe dormis.

Neeble! Neeble dormi dum tia ŝtormo, sed la evangeliisto volas diri ke tiu ŝtormo ne koncernas Jesuon, ĉar li volas iri al la paganoj, estas la disĉiploj kiuj provokas tiun ĉi ŝtormon.

Nu, la disĉiploj reagis, vekas Jesuon kaj demandas de li: *«Majstro, ni pereas! Ĉu Vi neniel zorgas pri tio?»*.

Vekite, Jesuo admonis la venton, kaj diris al la lago: «Silentu, kvietiĝu!». Tiu esprimo indikas la dian kondiĉon, tiun kiun ankoraŭ pri Jesuo ili ne komprenis. Vidu ili ĵus vokis lin “Majstro”, kaj fine ili sin pridemandos “sed kiu do estas tiu?”

Diris la psalmo, psalmo 107 kaj psalmo 89, ke Dio regas la maron kaj la ŝtormojn, Jesuo do montras sian dian kondiĉon ĉar li volas komprenigi ke iri renkonte al la paganoj ne estas iri kontraŭ la Dia volo, sed estas ĝuste manifesti la amon de tiu Dio “por kiu”- Petro eldiros tiun ĉi belegan esprimon “neniu persono estas ekskludita de lia amo”.

Diros Petro, post la komenca rezisto iri al la paganoj, *“ke Dio montras al mi ke oni ne devas diri profana aŭ abomene malpura al kiu ajn persono”* (Ago 10, 28). Ekzistas neniu homo surtere kiu povas sin senti ekskludita de la dia amo.

Jesuo, kiu estas Dio, volas do porti tiun ĉi amon al la paganoj, la disĉiploj rezistas je tio.

Kaj Jesuo ilin riproĉas, Jesuo ne aprezas la helpopeton kiun ili faris kaj diras al ili ke ankoraŭ ili ne kredas, havas eĉ ne unu kred-eron, grandan kiel la sinap-grajnero por porti la amon de Dio al la homaro.

Jen, antaŭ tiu ĉi okazaĵo la komento de la disĉiploj: *«Kiu do estas tiu? Eĉ la vento kaj la maro obeas al Li!»*

Ili do komprenas ke Jesuo estas ne nur tiu majstro kiun ili alparolis, sed en li estas io eksterordinara, io nova, kiun, iom post iom, laŭ la daŭro de la evangelio, ni ekkonos.

